# Novjorka Prismo

Numero 120 | Januaro 2003


*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia januara kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 17-an de januaro 2003, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Alfredo Petrov parolos pri *Geologio kaj Juveloj.* ★

## Nia Zamenhofa Festo, la 20-an de decembro 2002



Vendredon, la 20-an de decembro 2002, ESNY okazigis sian Zamenhofan Feston. Ĉeestis preskaŭ 30 personoj en malgranda ĉambro. La ĉeestantoj komencis alveni je la sesa horo kaj duono ptm. Ĉeestis esperantisto el Nepalo, Kabindra SHAKYA. Ankaŭ ĉeestis Rachel P. DORNHELM, ĵurnalistino de NPR (Nacia Publika Radio), kiu intervjuis kelkajn ĉeestantojn. Ankaŭ ĉeestis la tuta familio Medrano. Ankaŭ ĉeestis kelkaj aliaj tre amataj membroj, kiuj ne ofte ĉeestas. Ankaŭ ĉeestis nova esperantisto, 14-jaraĝa Jake SCHNEIDER, kiu studis la lingvon el libro kaj parolis Esperanton la unuan fojon ĉe nia festo, kaj lia patro, kiu kantis en Esperanto la unuan fojon ĉe la festo.

La manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis bonegaj: vinoj, 'ĉipoj', 'salso', 'kiŝo', legomoj, fruktoj, kuketoj, dolĉaĵoj. La manĝaĵoj kaj trinkaĵoj donis vere internacian karakteron al la festo.

Je la oka horo ptm, nia prezidanto, Tomaso ECCARDT, anoncis, ke Nijl BLONSTEIN volontulis esti nia nova programdirektoro. Neniu proponis aliajn kandidatojn, do la listo estis akceptata, kaj ne necesis voĉdono. La samaj personoj daŭre plenigos la aliajn postenojn.

Post la klubaj aferoj, kelkaj personoj parolis pri la vivo de Zamenhof, la kreinto de nia lingvo, kaj la fondinto de nia movado. Oni demandis pri la interna ideo, kiu, laŭ kelkaj, estas Homaranismo.

La Zamenhofa Festo estis kiel kutime tre ĝoja afero. Ni ne foriris de la ĉambro ĝis post la 9-a horo ptm. ★

*Raportis: Stuart GREEN*



## Kanto

Unu el miaj studantoj, Luis COIG, verkis la suban kanton. Ĝi estas burlesko de iu el la personaĵoj en la teksto de mia Esperanto-kurso. Temas pri la viro en leciono 9, kaj per la du unuaj linioj, evidentiĝas, ke la leciono ankaŭ temas pri Esperantaj participoj.

– *T. E.*

Se la vojo ne estas riparata,
kaj la tablo ne estas reservita,
diru al mi, amanto mia,
se vi povas atendi kun mi.

Kaj se ni devas iri kune
mi proponas ke ni marŝu rapide,
ĉar vi scias, ke la kelnero ne
komprenos
se denove, malfrue ni alvenos.

Kara virino mia
restu hejme kun mi,
ĉar mi ne volas iri
al la restoracio por manĝi kun vi.

Ni povas kuiri hejme
kun tomato kaj vin'
Kaj ni ĝuos pli bone,
mia bela amanto,
dolĉa virin' ★

## Venu al Bostono ĉi-somere por la 51-a Jarkongreso de ELNA!

**KIAM:** 3-6 julio 2003

**KIE:** MIT en Cambridge, Massachusetts, Usono tuj apud Bostono

**KIO:** Amuzega semajnfina landa kongreso de usonaj esperantistoj. Tamen kanadanoj kaj amikoj el aliaj landoj estas kore bonvenaj!

**KIAL:** La kongreso okazos tuj antaŭ la fama somera kursaro NASK, en la ŝtato Vermont. La bostona estas eble la plej bona proksima flughaveno, al kiu flugi kaj veturi al NASK. Do facilas ĉeesti ambaŭ! Estos internacia etoso! La partopreno de la internaciaj studentaro kaj instruistaro de NASK, kaj la proksimeco de Kanado kaj aparte de franclingva Kanado, certigos diversan kongreson. Estos muziko! Ni aranĝas nun la ĉeeston de famaj E-muzikistoj. Tio kaj la vigla junulara E-komunumo en tiu ĉi regiono certigos muzikan, junecan, kaj festan etoson!

Por pli da informoj vizitu nian TTT-ejon! *http://esperanto.org/ELNA/kongreso2003/* ★

*– el e-poŝto de Jacob B. SCHWARTZ <quark@mit.edu>*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Januaro 2003** — **17**

ESNY KUNVENO
Alfredo Petrov: Geologio kaj Juveloj
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Februaro** — **2**

Tagmanĝo
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 121)

**21**

ESNY KUNVENO
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## IBM Plaza

La 5-an de januaro, 13 ESNY-anoj kunvenis en IBM Plaza por babili. Oni diskutis pri multaj interesaĵoj, inkluzive Shakespeare kaj la ĝustan uzadon de la esprimo "pli malpli + cifero". ★

– *Tom ECCARDT*

## Pagintaj anoj de Esperanto-Societo de Novjorko 2002

| | | | |
|---|---|---|---|
| Michael Austin | A. Dymnikov | Ernest E. Kovary | Susan Polgar |
| Arlen Baden | Leonard Dzelzitis | Thomas Leong | Mary Pulley |
| George Baker | Thomas M. Eccardt | Martin L. Levine | Lillian Rachele |
| Randell Barclay | Jill Sophia Fein | Pamela Lieber | Douglas M. Rose |
| Lynn C. Bartlett | Adolph Fuerst | E. James Lieberman | Mark Ryszewski |
| Ulrich Becker | Margot H. Gerson | Jon Liechty | Maki Sano |
| Marta L. Bergonzoli | Irene Ginsberg | Cécile Low | Janos Ŝipos |
| Nijl Blonstein | Stuart M. Green | Steve Mann | Sijimin |
| Arturo Bonetti | Rochelle F. Grossman | Yevgeniy Markov | Sofiya Soskina |
| Robert Brizel | T. Julian Hashimoto | Emily Medrano | Witold Symonowicz |
| D-ro Paul J. Burke | Hortense Howell-Barber | Rebecca Medrano | Dr. Gloria C. Taylor |
| Norman B. Calvert | Pierre Jelenc | Nancee Medrano | Arnold Victor |
| Emine Semra Çelik | Renata Kaczmarska | Jim Medrano | Shep Wahnon |
| Richard P. Connell | Alexander Karkovsky | Laura Miller | Maurice J. Wittenberg |
| Nelly Delpino | David Kobaladze | Carlos E. Ortiz | Tomoko Yamashiro-Petrov |
| Richard D. Dinnen | Susan D. Kohn | Dan Perlman | Yingjie Zhang |

**Sumo: 64**

*Krome, 17 personoj aŭ grupoj abonis al* Novjorka Prismo. ★

## Enrike transloĝiĝis

Karaj: Mi transloĝiĝis al Kalifornio, iomete sude de San Francisco. Nun mi intertempe loĝas ĉe mia filino, kaj en januaro mi havos mian propran domon. Mi ne plu aliĝos al la novjorka klubo.

Salutas vin, kaj bondeziras por la jarfinaj festoj

*Enrique Ellemberg*
*senhejmulo en Kalifornio*
*ne plu en NY ŝtato*
*Enrike@aol.com* ★

*Feliĉan Novjaron!*


**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6316
**Korespondа Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (914) 738-6084
**Program-Direktoro** Neil Blonstein (212) 663-2020

**Novjorka Prismo**
Numero 120 – Januaro 2003
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com


© 2003 Esperanto Society of New York